

Christian Friedrich David Schubart,

## La truto

*tradukita de Ludwig Schödl*

En riveret' malvarma,  
Ja en petola ag'  
Kaprica truto ĉarma  
Saltetis kiel sag'.  
Mi staris ĉe la bordo,  
Rigardis kun plezur'  
La fiŝon en akordo  
Kun rivereta pur'.

Malice kun intenco  
Ĉe l' bordo gvatis vir'  
Kun vergo, kun fimenso  
La truton kun dezir'.  
Se l'akva kristaleco  
Nur restos, pensis mi,  
Al fiŝa libereco  
Atencus vane li.

Sed nun senpacience  
La fiŝkaptont' aĉigas  
Akvon li intence  
Kaj jam el ĝia ond'  
Trompitan truton tiras.  
Kaptita, ho karul',  
La koron vi disŝiras  
Amata, vi ĉarmul'!

...

.....  
.....,  
.....  
.....  
.....  
.....,  
.....  
.....

*Traduko de la Germana poemo "Die Forelle" de CHRISTIAN FRIEDRICH DAVID SCHUBART (\*1739-03-24 - †1791-10-10) en Esperanton de LUDWIG SCHÖDL (\*1909-10-31 - †1997-02-20).*

*Arg-832-1670 (2013-02-20 09:46:20)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la kantlibreto „Ni kantas“, eldonita en 1980 de la Centra Laborrondo Esperanto de Kulturligo de GDR, redaktita de Ludwig Schödl. Pri la tradukinto vidu la vikepedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Schödl](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Schödl).*